JARO IIIa/VIIa. № 5 — 6 MAJO — JUNIO 1928

ESPERANTO-LINGVA RESUM-FOLIO DE

# LA VOJO DE KLERIGO

MONATA PEDAGOGIA REVUO

ШЛЯХ ОСВІТИ
ПУТЬ ПРОСВЕЩЕНИЯ

Organo de la Ŝtata Scienca Metodologia Komitato ĉe la Popola Komisario por Klerigo de l'Ukraina Socialista Sovet-Respubliko

Redaktejo kaj Administrejo: K. Liebknecht-str., 31 — Ĥarkov — Ukrainio — USSR

№ 5—6 (73—74) de „La Vojo de Klerigo" enhavas 76 artikolojn k notojn sur 260 paĝoj.

## ĜENERALAĴOJ

V. Jastrĵembski. Al la IVa tutukrainia konfero pri popola klerigo. La unaj tri konferoj (1919, 1920, 1921) havis kiel taskon akceli la likvidon de l'malnova lernejo k krei novan sovetan klerigan sistemon. Depost tiam pasis kelkaj jaroj, la cirkonstancoj multe ŝanĝiĝis. Nun, sur nova grundo estas konstruata la fundamento de l'socialisma socio, k la nuna signaldiro estas: Por socialismo-konstruado! Por socialisma kultura revolucio! Multaj gravaj taskoj aperas nun ĉe la kulturfronto, k la konfero devas ilin profunde pritrakti k montri la vojon por ties solvo.

Al la demando pri l'biblioteka politiko. La artikolo, verkita laŭ la materialoj de l'biblioteka fako ĉe la Ukrainia Ĉefa Administrio por Politika Klerigo, determinas la klerigan rolon de bibliotekoj k la aktualajn taskojn de ties gvidado. Bibliotekoj trapenetras la tutan sistemon de l'popola klerigo; ili estas neforigebla, integranta elemento en ĉi-sistemo. La bibliotekoj estas disklasigeblaj je: mas-b., lernej-b., b. specialaj, ŝtataj b. Post karakterizo de ĉiu el tiuj b.-tipoj, difino de ilia cel-direkto, taskoj k gvid-tendencoj, estas starigata la problemo pri reorganizo de l' ŝtataj b. por forigi duoblan laboron, raciigi la funkciadon k plifaciligi la eluzon de ĉiuj libraro-ricaĵoj.

## METODOJ POR KLERIGA LABORO

I. Lenj. Pri labor-divido inter instruistoj ĉe la dua koncentro de l'laborlernejo. Ĝis nun plejparte ĉe la 2a koncentro (12—15 j.) regas divido laŭ la instru-fakoj, kiu postrestis kiel heredaĵo de l'malnova lernejo. Ĝi estas nekontentiga laû la vidopunkto de la nova pedagogio k tial forlasenda. Bazante sin sur la trijaraj spertoj de la Marx-lernejo en Ĥarkov, la aŭtoro konigas la novan sistemon de labor-divido, tie praktikitan: la tuta studmaterialo estis dividita komence je 3 (natur-, labor- k soci-scienca) k poste je 2 (natur- k soci-scienca) cikloj, el kiuj ĉiun gvidis un instruisto; k la tuta studlaboro procedis laŭ komuna „kompleksa" programo. Tia kuncentrigo de la studoj sub la gvido de du instruistoj akorde laborantoj havas multajn avantaĝojn, el kiuj estas notenda: 1e—uneca laborplano; 2e—plifaciligo de komuna laboro de l'instruistoj; 3e—pli natureca ordo de l'komplekso-studoj; 4e—forigo de l'fakeca „dispecigo" de la studoj k plifaciligo de tuteca pristudo de l'kompleksoj; 5e—plisimpligo de l'memkontrolo k kontrolo de la studoj. Ĝenerale, la laŭcikla divido montris siajn avantaĝojn kompare kun la laŭfaka ĉe la kompleksaj studoj en la dua koncentro de l'labor-lernejo.

O. Figurin. Konsult-oficejo kiel formo por interligo de l'supera pedagogia lernejo kun la instruistaro. La manko de kontakto inter la pedagogia superlernejo k la instruistaj masoj estas bedaŭrinda fakto, pro kiu grave suferas la mas-lernejo. Inter la organizo-formoj por starigi tian aktivan interligon estas rekomendindaj konsult-oficejo ĉe l's. p. l. La k-o. devas komence veki pliperfektiĝemon ĉe l'mas-instruistaro, agiti ĝin por memklerigado k montri la vojon ĉi-direktan; plue ĝi devas organizi tiun pliperfektigan memklerigon, k fine—gvidi ĝin. La aŭtoro priparolas apartajn konkretaj funkciojn de k.-o. k pruvas, ke per intensa laŭplana laboro estas atingeblaj ne nur gravaj progresoj ĉe la mas-instruistaro, sed anke konsiderinda utilo por la pedagogia superlernejo mem.

A. Kotik. Perkoresponda lernejo, ĝia strukturo k ĝia labortago. Perkoresponda instruado estas nova fenomeno en la adoltula klerigado.

Ĝi aperis komence en Usono ant duonjarcento, k nun tie funkcias kelkcent p-k. lernejoj kun pli ol 3 milionoj da studantoj diversfakaj. Ĉi-lernejoj atingis grandajn progresojn en sia organizo, en siaj instru metodoj k ties rezultoj, kvankam ili estas plejparte privataj komercaj entreprenoj. En la antrevolucia Rusio p.-k. instruado originas de 1894 k anke montris sian valoron. Post la revolucio nur en 1926—27 estis komencita sistemeca laboro ĉi-direkta. Laŭ sia strukturo la p-k. l. multe similas al l. ordinara: ĝi havas studantojn, instruistojn, studoplanojn k programojn, lernolibrojn ktp.; alia estas nur la gvidado, la konsultado, la kontrol-ekzamenado. La instru-personaro de l'p-k. l. konsistas el lernolibro-verkantoj, konsilantoj k korespondantoj; ĝia laboro postulas apartan atenton al la eldonaĵoj k leteroj. La problemo pri laboratoria k praktika laboro de l'studantoj estas solvebla nur per la helpo de lokaj organizoj. La abundo de l'korespondaĵoj (ties nombro ĉiam karakterizas la situon de l'p-k. l.) postulas racian sistemecan organizon de l'laboro en la gvida centro de l'p-k. l., kiu devas funkcii kiel preciza mekanismo k samtempe kontentigi ĉiujn bezonojn de l'studantaro. La aŭtoro ekspozas la spertojn ĉi-rilatajn el Usono k tiras konkludajn sugestojn por Sovetio.

## KLERIGA PRAKTIKO

J. Sambros. Al pristudo de l'interligo de la lernejo kun la komunista infanmovado. La problemo pri interligo, interefiko k kunlaboro de l'lernejo kun la k. i.-m. estas un el la plej aktualaj edukad-problemoj en Sovetio. Temas pri 1e—partopreno de l'instruisto en la k. i.-m. por akceli la teknikan kreskadon de l'infanaro sur la bazo de l'marxismaj stud-programoj; 2e—adapto de l'lernejo al la postuloj de l'k. i.-m.; 3e—interhelpo de l'instruisto k de la junkomunista gvidanto. La plej grava estas nun krei taŭgan enhavon k metodojn por la laboro de l'junpioniraj org-aĵoj en la lernejo. Tiucele preparan laboron devas plenumi la studesploraj kabinetoj por k. i.-m. La aŭtoro raportas pri la rezultoj de tia studprovo farita en Sumi. Estis enketitaj 28 lernejoj (el ili—22 vilaĝaj) kun ĉ. 1800 lernantoj, el kiuj 20—40% estis junpioniroj. Evidentiĝis, ke la j -p. grupoj laboras plejparte sensisteme, senplane, la instruistoj staras flanke, k la junulgvidantoj estas nepreparitaj por eduka laboro k malmulton faras por kontaktiĝi kun la lernejo. La k. i.-m. devas esti bazo de l' socia edukado en la mas-lernejo, sed dume ĝi havas tro nesufiĉan (18—20%) influon. Estas tamen jam nun konstatita, ke la junpioniroj plejparte (74%) ĝuas simpatiojn de l'ceteraj infanoj k de l'instruistoj dank'al sia aktiveveco, konscio k bona konduto; ili estiĝas socie-organiza fermento en la lernejo. Necesas helpi la instruiston intime interligiĝi kun la k. i.-m. k samtempe „pedagogizi" la junul-gvidanton—tiaj estas la praktikaj konkludoj el la farita enketo.

B. Manĵos. Labor-kutimoj en la plijuna koncentro de l'lernejo. La aŭtoro prezentas ĉ. tie la spertojn ĉi-rilatajn el Kiev-a ĉfabrika elementa labor-lernejo (kp. №№ 1 k 2-3/1927). Tri kriterioj estis starigitaj por selekti manlaborajn taskojn en programigendajn: konformo kun la infan-fortoj, intereso de l'infanoj dum la plenumo, eduka utilo. Por kontrole esplori la taŭgeston de l'praktikataj taskoj el tiuj tri vidopunktoj, kuracisto-pedologo estis observanta la fiziologian staton de l'lernantoj dum la laboro, k samtempe pedagogo kun meti-majstro estis observantaj la infanan labor-konduton. El tia kontrol-observado en la naturaj kondiĉoj de l'labor-eduka procedo oni tiris konkludojn por raciigo, normigo de l'labor-programoj sur objektiva pedologia bazo. La rezultoj estas prezentataj en du tabeloj aldonataj k en „standarda" (norma) programo.

V. A. Pravdolubov. Provo pedologie ekzameni la problemon pri porinfana kino-repertuaro. La studo prezentata de la aŭtoro estis farita en la Moskva Instituto por Metodoj de Lerneja Laboro. Pli ol 3000 gelernantoj 8—19 j. el diversaj lernejoj (85%—el Moskvo k 15%—el Samara) estis enketitaj. La enketo konsistis el du partoj: ĝenerala (pri kino-filmoj ĝenerale) k speciala (pri filmo ĵus demonstrita). Ĉiu demandito donis po 15—18 respondoj,—sume do estis ricevitaj ĉ. 50.000 skribaj reagoj pri l'nuna kino-repertuaro. La aŭtoro detale prezentas la rezultojn de statistika prilaboro k analizo de l'respondoj k faras el tiuj rezultoj kelkajn ĝeneralajn metodologiajn k praktikajn konkludojn. La nuna stato de l'kino estas netolerebla: ĝi difektas, kripligas,

kelkiam eĉ pereigas la infanojn. La infanoj postulas apartan kino-repertuaron por si, konforman kun iliaj bezonoj; gajan, vigligan, originalan, interesan, instruivan, „ne-amozan“; necesas do senprokraste ekprodukti tian filmaron. La fabrikado de ĉi-filmo devas esti bazita sur scienca studesploro pri l'interesoj k bezonoj de infano k adoleskulo, k tial pedologoj, pedagogoj, kuracistoj, artistoj k. a. devas kunlabori sur ĉi-tiu kampo. La kino devas fariĝi grava edukad instrumento. Eksperimentaj porinfanaj k poradoleskulaj kinejoj estas kreendaj.

## VIVO DE KLERIGO

M. M. Dua tutsovetia kongreso de judaj kulturlaboristoj. La kongreso, kunveninta en Ĥarkov en marto 1928, estis tre multnombra k altiris grandan atenton de l'juda publiko, precipe de la edukistaro. La tagordo enhavis la jenajn punktojn: 1. La 10 revoluciaj jaroj ĉe la judaro k taskoj de l'kultur-konstruado. 2. Raportoj de l'Narkopros-oj de Rusio, Ukrainio k Blankrusio pri l'juda kulturlaboro. 3. Reformo de l'juda ortografio. 4. Judlingva scienca esplora laboro. Ĉiuj raportoj konstatis grandajn progresojn de l'judaj kultur-instituoj sovetiaj dum la tri jaroj pasintaj post la una kongreso (Moskvo, 1924). La kongreso k ties sekcioj larĝe k profunde pritraktis la aktualajn problemojn starantajn sur ĉiuj parceloj de la juda kulturlabora kampo k ellaboris direktivojn por la plua agado.

P. Mostovi. Al la soveta lernejo — novan lernolibron. Fine de marto ĉ. 500 kelkregionaj praktikaj instruistoj k metodistoj estis kunvenintaj en Kijev por pritrakti ĉi problemon. En kelktagaj plenkunvenoj, sekciaj k subsekciaj kunsidoj oni tre serioze prilaboris la fundamentan temon kun ties ĉiuj detaligoj. Tre akraj kritikoj kontr la ekzistantaj lernolibroj, postuloj krei novatipan „labor-libron“, pedologia k metodologia surbazigo de l'verkotaj l.-l., hejmregiona tendenco, decentrigo de l.-l.-verkado k laŭregiona organizo de l'l.-l.-verkantoj, ideologia k teknika revizo de praktikataj l. l., aprobo de l.-l. nur post praktika prov-ekzameno k multaj specialaj postuloj al apartaj l.-l.,—jen la ĉefaj ideoj, kiuj svarmis ĉe la konfero. El la multaj akceptitaj deziresprimoj ni notu la ĝeneralajn: la soveta l.-l. devas a) havi marxisman ideologion, b) esti orientita je aktivaj stud-metodoj, c) konformi kun la ekzistantaj lernej-programoj, d) prezenti la sciojn en ties interligo kun la vivo, e) esti bonlingva, belaspekta k malmultekosta. (Kp. art. de Miĥalovski—№ 4).

T. B. Stato de l'pedagogia instruado en Ukrainio. La senĉesa kresko de l'kultur-konstruado postulas multajn kleriglaboristojn. La ĉi-lastaj estas nun preparataj en: 60 pedagogiaj teknikumoj (3-jaraj), 12 fakultatoj por socia edukado (4 j.), 4 fak. por profesia instruado (4 j.), 3 ped. kursoj ĉe teknikaj superlernejoj (1 j.), 3 ped. fak. ĉe belartaj s.-l., kursoj por fizik-kulturo-instruistoj, fakultato por politika klerigo, kursoj por manlaboro-instruistoj, kursoj por instr. pri fremdlingvoj. La nombro de l'pedagoga studantaro atingas 17.000. Kaj tamen la bezonoj pri kleriglaboristoj multe superas ĉi-nombrojn, k tiuj de la maslernejo estas nun kontentigataj nur je 25% (kompleta kontentigo estas antevidebla en 1932). Post analizo de diversaj statistikoj la aŭtoro faras revuon de l'ĝenerala situo de la ped. lernejoj k konstatas samtempe kun progresoj (finkonstruo de l'sistemo de ped. instruado, normigo de l'studo-planoj k programoj, stabiligo de l'instru-personaro, plibonigo de l'materia stato, pliperfektigo de l' instru-metodoj k de la praktikado, ukrainizo, socia aktiveco, kresko de l'laborularo inter la studentoj, nombra k kvalita kresko) anke plurajn mankojn forigendajn (manko de lernejoj por kelkaj eduko- k instru-fakoj, nesufiĉa kvalifiko de l'instruistaro de l'pedag. lernejoj, nesufiĉa atento al la instru-teknikoj, nesufiĉa preparitesto de l'komencantaj studantoj, neĝusta dislokigo de l'ped. teknikumoj, mankoj en la distribuo de l' juninstruistoj, nesistemeco en la eldonfunkcioj de l'ped. lernejoj).

A. Z. Una tutsovetia konfero de redaktantoj de pedagogaj gazetoj. La sovetaj p. g. estas grava faktoro en la edukada vivo: ilia nombro atingas centon k kelkaj el ili havas tirkvanton da pluraj mildekoj. Por sumigi k kolektive prilabori la akiritajn spertojn, por difini k racie distribui la taskojn, por ellabori pli bonajn labor-formojn k -metodojn, la redaktistoj de l' sovetiaj p. g. kunvenis fine de aprilo en Moskvo. Estis pritraktitaj pluraj temoj: popola klerigo k taskoj de l'p. g., tipizo de l'p.g., stato k taskoj de l'naciminoritaj p. g., komunisma edukado k

taskoj de l'p. g., p. g. k lokalizo de l'lernej-programoj, organizo de l'korespondantoj, interligo kun eksterlando, starigo de pedagogia gazet-oficejo, konsultado ĉe p. g. ktp. La akceptitaj decidoj k deziresprimoj certe helpos progresigi la sovetan pedagogian gazetaron.

E. Françon. Pedagogiaj konferoj en Francio. Nia Lyon-a korespondanto priskribas la juran situon de l'ĉiujaraj instruistaj kunvenoj, oficiale kunvokataj en ĉiu kantono k nomataj „pedagogiaj konferoj", k la rilaton de l'instruistaro al ili. Per pluraj ekzemploj li montras, ke ĉi-konferoj, en sia nuna formo, sub la burĝa regimo havas tre malgrandan k mallarĝan pedagogian valoron, tute ne kapablante servi al renovigo de l'edukado. Tial do la francia avangarda edukistaro opozeme rilatas al la p. k. k direktas sian aktivecon al revolucia kunbatalo—en la vicoj de l'organizita proletaro—por ĝenerala socia emancipo, kiu ebligos anke profundan edukado-rekonstruon.

## LINGVO K LITERATURO EN LERNEIO

V. Doha. La problemo pri lingvo-metodiko en la ukraina laborlernejo. La celo de l'lingvo-studoj en la labor-lernejo estas: eduki socie-utilajn lingvajn scipovojn k kutimojn subordigitajn al la ĝeneralaj socie-utilaj funkcioj. Tio necesigas: konscian science-bazitan rilaton al la lingvo, plejeble rafinitan „lingvo-senton" ĉe uzado de lingvo-formoj, kapablon subtile kompreni la enhavon k formon de belliteraturo ktp. Konsekve, la lingvo-edukado devas enhavi: a) organizon de tiuj momentoj el la medio, kiuj plej bone stimulas lingvajn reagojn; b) konsciigon k ĝeneraligon de l'lingvaj reagoj; c) direktadon de l'infana lingva aktiveco. La aŭtoro priparolas ĉiujn-ĉi edukado-momentojn k aparte fiksas la atenton je la loko de l' lingvo en la komplekso-studo (la senperaj fenomenoj de l'cirkumanta vivo estu la deira punkto ĉe la lingvo-studoj) k je la problemo de infana verkado k aktiveco (parola k skriba) ĉe la lingvo-studoj. Fine estas proponata science esplori la infanan lingvan aktivecon el la vidopunkto de la plej aktualaj metod-problemoj: lingvaĵon, lego-interesojn, lingvoekzercajn mekanismojn ktp. La laboro farenda estas grandega: ĉiuj—teoriuloj k praktikuloj—devas direkti al ĝi sian energion.

M. Demjanovski. L'ukraina lingvo en la laborlernejo laŭ la oficialaj programoj. La mankoj konstatataj ĉe ukrainlingvo-studoj en laborlernejo dependas, laŭ la opinio de l'aŭtoro, de la neperfektesto de l'programoj. Post kritika analizo de la lastaj, li ekspozas siajn sugestojn por perfektigo: 1. Doni pli da loko k pli da aŭtonomio al la lingvo-studoj en la celdirektita kompleksa pedagogia procedo. 2. Pliigi la ekzercojn pri lego- k skribotekniko. 3. Enkonduki ortoepion k kulturadon de l'vivanta lingvo en la lernejo. 4. Detaligi k konkretigi la programojn. 5. Aparte atenti la bezonojn de l' kvarjara maslernejo. 6. Organizite k laŭplane kolektadi k prilabori la instruistarajn spertojn kun samtempa eluzo de l'progresoj de la lingvoscienco.

Prof. A. Muziĉenko. Legado k vortkulturo en la nuna lernejo (Fino—v. № 4). Daŭrigante sian skizon, la aŭtoro priparolas la „material-selekton", scipovon konscie k memstare serĉi k trovi en diversaj fontoj materialon necesan k taŭgan por solvi la problemojn k plenumi la laboron postulatan por la studata vivo-komplekso. Detale k konkrete klarigînte tiun materialon k ties fontojn, li fiksas la atenton je l'metodar-tekniko ĉi-rilata. La ĉefaj principoj ĉe l'elekto de belliteratura peco estas: 1e—ke ĝi tiel sekvu el la studsituo, ke la infanoj psikologie estu ĝin atendantaj; 2e—ke ĝi ne prezentu al la infanoj ion fremde-novan, nekomprenëblan. Post la tralego de l'peco oni povas (depende de ties imaga potenco): igi la infanojn desegni iun scenon; detaligi iun parton; drame enscenigi; fari rakonto-skemon; deklami; elekti imagivajn vortojn k parolturnojn; montri bildon; apliki kantojn k muzikon; legi aliun analogan literatur-pecon; analizi la verkostimulojn de l'aŭtoro. Samtiel estas prilaborataj anke aliaj (ne-belliteraturaj) verkoj: politikaj k a. La aŭtoro ilustras sian artikolon per pluraj ekzemploj el siaj personaj spertoj: ĉi-ekzemploj montras veran edukisto-majstron, forte konvinkas k entuziasmigas.

M. Vasilkivski. Programo pri ukrainlingvo en maslernejo profesia. La soveta profesi-lernejo devas doni al la adoleskulo certan kompletan provizon da teknikoj, labor-konojn k -scipovojn; ĝi devas formi anke socie-utilajn lingvo-mekanismojn. Deirante el tia pozicio, la aŭtoro notas plue,

ke la ukrainlingvo-studoj en profesi-lernejo devas havi du metod-bazojn: ĝenerale lingvajn k specifajn por la nuntempa ukrainlingvo. Post tia enkonduko estas prezentataj du program-projektoj: por ukrainoj k por ne-ukrainoj.

## SOCISCIENCAJ STUDOJ EN SUPERLERNEJO

V. Jastrĵembski. Al la dua tutukrainia konfero de instruistoj pri sociscienco en superlernejoj. La sociscienciaj studoj en superlernejoj ne estas sufiĉe saturitaj de l'spirito de vere militanta marxismo-leninismo, ili ne estas sufiĉe intime ligitaj anke kun la celdirekto de l'lernejo, kun ties fako; krome, la instru-metodoj estas multe perfektigendaj, aktivigendaj; fine, la instruistaro ne staras ankore sur al necesa nivelo. Montrinte tujn forigendajn mankojn, la aŭtoro, prezidanto de la Ŝtata Scienca Metodologia Komitato, esprimas la esperon, ke la konfero okazonta en junio plenumos siajn taskojn k forte akcelos la taŭgan formadon de novaj ruĝaj fakuloj, tiom necesaj por la socia rekonstruo, por la industriizo de l'lando, por la kultura revolucio.

A. Z. Aleksandrov. Insru-metodoj por ekonomiaj disciplinoj en superlernejoj. La aŭtoro opinias, ke laŭ vidopunkto metodologia samkiel metodika estas neĝusta studi la fundamentajn problemojn de l'soveta ekonomio kune kun tiuj de l'ekonomio kapitalisma en komuna kurso pri politika ekonomio; nur postkiam la kurso de p. e. kapitalisma estas finita, oni devas teorie pritrakti tiun sovetan, reliefigante ties specifajn trajtojn. La kurso de ekonomia politiko devas unavice prezenti teorian surbazigon de l'celdirekto de la soveta e. p. k klarigon pri la Lenin-a plano por socialismo-konstruado; la aktualaj problemoj devas ĉiam okupi gvidan lokon en ĉi-kurso. Ekonomia geografio estas ankore tro malmulte prilaborita en la marxisma literaturo; multo estas ĉi-tie farenda por interligo de l'teorio kun la praktiko; troa praktikismo estas evitenda samklel pura akademismo. Tuŝante la instru-metodojn propradire, la aŭtoro parolas kontr komunmetodoj ĉie k ĉiam aplikendaj k pledas por plejebla variado, modifo k adapto al la realaj cirkonstancoj k specifaj kondiĉoj de ĉiu aparta superlernejo.

Prof. N. J. Mirza-Avakjanc. Al la demando pri instru-metodoj por historiaj disciplinoj en superlernejoj. Analizinte la nunan staton de l'histori-studoj en superlernejoj, la aŭtorino konstatas plurajn gravajn metodajn mankojn en ili. Plue ŝi formulas siajn sugestojn por pliperfektigi ĉi-studojn: enkonduki scienc-esploran tendencon; eviti unikan praktikadon de iu sola metodo k uzi metodon kombinitan, modifatan en ĉiu kurso-parto konforme kun la specifeco de la lasta; laboratoriajn studojn fari nur en specialaj kabinetoj k ĉiam sub la gvido de l'instruisto; praktiki historiajn ekskursojn; konkrete, konforme kun la marxisma metodologio, analizadi la historiajn faktojn. Aparte estas tuŝita la problemo pri eldono de dokumentaroj pri ukrainia historio.

J. Hepner. Historia materialismo en superlernejoj. La nova programo ĵus enkondukata enhavas kontentigajn ŝanĝojn (kp. art. de l'sama aŭroro—№ 8 9/1927): la filozofiaj bazoj de l'marxismo, ties organeca ligitesto kun la sciencoj (precipe kun natursciencoj) k staranta sur tia bazo kritiko de l'idealismo—jen la ĉefaj trajtoj de tiu programo. Analizante la ĉi lastan, la aŭtoro ĝenerale aprobas ĝin, sed samtempe notas kelkajn mankojn en la disgrupigo de l'studenda materialo. Fine li atentigas pri ja neceso verki novajn lernolibrojn konformajn kun ĉi-nova programo. (Kp. art. de Hofman—№ 5/1927).

E. K. Didiĉ. Historia materialismo en pedagogia superlernejo. La programo pri h. m. devas varii en diversaj superlernejoj, konformiĝante kun ĉies fakaj bezonoj. En ped. s. l. ĝi estas „pedagogizenda“: klarigo de l'fundamentaj pedologiaj k pedagogiaj nocioj per marxisma teorio—jen la ĝusta vojo. Ĉiu tezo de l'h. m. estas ilustrenda per pedagogia materialo, k krome—estas enkondukendaj kelkaj specialaj temoj rilatantaj al teoria surbazigo de l'marxisma pedagogio (marxismo-leninismo k pedagogio, pedagogio k ĝia klaseca enhavo, biologiaj k sociaj faktoroj en edukado, psikologio materialisma k idealisma, mekanisma materialismo en pedagogio k ties eraroj, soveta pedagogio k. a.); fine, praktikaj memstaraj laboroj ĉi-rilataj de la studantoj devas kompletigi la kurson. La aŭtoro prezentas skemon de programo pri h. m. por ped. s. l. k akcentas, ke por realigi ĝin necesas du kondiĉoj: 1e—konstanta intima

kontakto de l'instruisto pri h. m. kun tiuj pri pedagogiaj disciplinoj; 2e—„pedagogizo“ de l'instruisto pri h. m. mem.

## KRONIKO

Tra Sovet-Ukrainio: Por norma studo-jaro en elementa lernejo. Distriktaj lernejaj salonoj k placetoj por korpkulturo. Instruado pri korpkulturo en lernejoj. Partopreno de l'lernejoj en la „monato por protekto al animaloj k plantoj“. Antireligia edukado en lernejo. Infanar-ekskursoj al la tombo de Ŝevĉenko. Ferioj en antelernejaj edukejoj. Akcepto de senprizorguloj al infan-hejmoj. Enketo pri lokaloj de internedukejoj. Kontrolo de la scioj de absolvantoj de profesi-teknikaj lernejoj. Oficejoj por kampar-ekonomia konsultado ĉe kampar-ekonomiaj superlernejoj. Kontrolo pri l'laboro de vintraj kamparekonomiaj lernejoj. Konfero de administrantoj de urbaj kamparulaj domoj. Ordo por eksoficigo de pli ol 65-j.-aĝaj instruistoj de superlernejoj. Konkurso pri porinfana teatraĵo. Agado de l'Ukrainia Ŝtata Eldonejo.

Tra Sovet-Unio: VIa tutrusia kongreso de l'ĉefoj de guberniaj popolklerigaj administrioj. Pliperfektigado de la gvidantoj de l'popola klerigo. IVa tutrusia kongreso por antelerneja edukado. Praktikumo por edukistoj el infan-hejmoj k -kolonioj. Dimanĉa pedagogia universitato. Organizo de porinfanaj muzeoj. Brodkastadoj pri infan-edukado. Stato de universala instruado en Blankrusio. Universala instruado en Georgio. Popola klerigado en Uzbekio. Lernejsistemo en Armenio.

Eksterlande: Pedagogiaj Tagoj k kongreso de Eduk-Intern. Eŭropa pacifista instruista internacio k ties kongreso. Propagando pri l'Ligo de Nacioj en lernejo.—Germanio. Arbara lernejo en Weissenfels.—Ĉeĥoslovakio. Nova urba biblioteko en Praha. Protesto kontr ĉeĥizado en Postkarpatio.—Svisio. Someraj kursoj ĉe l'Instituto J.-J. Rousseau.—Usono. El la lernejar-statistikoj. Edukado en New-York.—Sud-Ameriko. Kongreso de l'sud-amerika instruistaro.

## BIBLIOGRAFIO

La rubriko enhavas grandajn revuojn de l'okcident-eŭropa pedagogia gazetaro por januaro-marto 1928 (estas referita pri 14 gazetoj diverslingvaj; la ĉefaj temoj: reformema epidemio, la vizaĝo al Sovetio, kampara lernejo, preparo k perfektigado de instruistoj, kontakto kun la gepatroj, psikologiaj problemoj) k de l'usona ped. gazetaro por la sama periodo (6 gazetoj referitaj; ĉefaj temoj: kampara lernejo, persono de l'studanto, gvidado k konsilado, instruista salajrado), du koncizajn revuojn (pri antelerneja edukado—4 libroj k pri porinfanaj legaĵoj—7 l.), 12 recenzojn pri novaj gazetoj k libroj rus- k ukrainlingvaj (ĝeneralaj problemoj de klerigo—1, socia edukado de infanoj—3, profesia instruado de adoleskuloj—2, lernolibroj—4, diversaĵoj—2) k kronikon de l'edukada literaturo aperinta 1.IV.—15.V. (estas enregistritaj 40 sovetaj eldonaĵoj: 23 ukrain-, 16 rus- k 1 bulgar-lingva).

---

La resum-folio de „La Vojo de Klerigo“ aperas ĉiumonate k estas senpage dissendata al ĉiuj interesatoj (oni komuniku la adresojn al la redaktejo: K. Liebknecht-str., 31—Ĥarkov—Ukrainio—USSR).

La revuo mem (ukrain- kaj rus-lingva) estas ricevebla kontr abono (abonpago: 9 dol. por jaro; 1 dol. por monato). Organizaĵoj edukistaj k redakcioj de pedagogiaj gazetoj povas ricevadi la revuon interŝanĝe je sia organo sendota al la redaktejo de „La Vojo de Klerigo“.

Ĉiuj kolegoj ricevantaj la resum-foliojn de „La Vojo de Klerigo“ estas petataj traduki ilin nacilingven k diskonigi ilian enhavon per la edukistaj organizaĵoj k per la pedagogia gazetaro de sia lando. Pri la rezultoj oni bonvolu informi la redakcion de „La Vojo de Klerigo“.

Samtempe ĉiuj kompetentaj avangardaj edukistoj estas invitataj kunlabori por la revuo per artikoloj k korespondaĵoj. Estas dezirindaj dokumentizitaj priskriboj de faktoj k spertoj. Amplekso de artikolo: de malgranda informa noto (1—2-paĝa) por la „Kroniko“ de nia revuo ĝis granda monografia studo (10—20-paĝa). Ant ol verki grandan artikolon oni bonvolu komuniki al la redaktejo prospekton k atendi respondon pri l'akcepteblo de la proponata artikolo. La artikoloj povas esti verkataj internaci- aŭ nacilingve. Por la akceptitaj artikoloj estas pagata honorario (25—30 dol. por presfolio=40.000 tipo-signoj).

La Redakcio de „La Vojo de Klerigo“

Перша друкарня Державного Видавництва України ім. Г. І. Петровського

Укрголовліт № 93/ж. 21/VI 1928. Зам. № 1687. Тираж 1270.

KUL